

Thomas Moore,  
La lasta rozo

*tradukita de Clarence Bicknell*

*kun ok-liniaj strofoj*

Jen la lasta rozeto  
de fora somer'!  
Ĝiaj belaj kunuloj  
jam velkis sur ter'!  
Ne restas parenco,  
ne unu rozflor'  
Partoprenas komplate  
en ĝia dolor'.

Mi ne lasos vin velki  
tutsola, ho roz'.  
Iru dormi kun ili  
en paca ripoz'.  
Nun viajn petalojn  
disĵetas mi for  
Al viaj kunuloj  
sen viv', sen odor'.

...

Thomas Moore,  
La lasta rozo

*tradukita de Antoni Grabowski*

*kun ok-liniaj strofoj*

Jen floras sola, forlasita  
La lasta rozo de l' somero,  
Dum ĝia ĉarma gefrataro,  
Velkinte kuŝas jam sur tero.  
Ne estas ia flor' parenca,  
Nek roz-burĝono en proksimo,  
Por interŝanĝi la ridetojn  
Aŭ la sopirojn, laŭ kutimo.

Mi vin ne lasos, ho soleca,  
Ĉagrene sur trunketo brili;  
Ĉar la karuloj viaj dormas,  
Do iru, dormu vi kun ili!  
Foliojn viajn mi afable  
Disĵetas sur bedeto jena:  
Vi kuŝu apud senaroma,  
Malviva kunular' ĝardena!

...

Thomas Moore,  
'T is the Last Rose of Summer

*kun ok-liniaj strofoj*

'T is the last rose of summer  
Left blooming alone;  
All her lovely companions  
Are faded and gone;  
No flower of her kindred,  
No rosebud is nigh,  
To reflect back her blushes,  
To give sigh for sigh.

I'll not leave thee, thou lone one!  
To pine on the stem;  
Since the lovely are sleeping,  
Go sleep thou with them.  
Thus kindly I scatter  
Thy leaves o'er the bed,  
Where thy mates of the garden  
Lie scentless and dead.

...

Tiel same volonte  
formortus mi mem,  
Se ne plu min atendus  
amika manprem'.  
Ĉar kiu kun koro  
en tiu ĉi mond'  
Volus loĝi izola  
sen amo-respond'?

Mi tiel sekvu, kiam pasos  
De l' amikeco flor' fidela,  
Kaj el brilanta amo-ringo  
Elfalos lasta ŝton' juvela.  
Ĉar kiam velkis veraĵ koroj,  
Sentemaj flugis for el rondo,  
Ho, kiu volus tiam loĝi  
Solece en malvarma rondo?

So soon may I follow  
When friendships decay,  
And from Love's shining circle  
The gems drop away.  
When true hearts lie wither'd  
And fond ones are flown,  
Oh! who would inhabit  
his bleak world alone?

*Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose of Summer" de THOMAS MOORE (\*1779-05-28 - †1852-02-25) en Esperanton de CLARENCE BICKNELL (\*1842-10-27 - †1918-07-17).*

*Arg-531-1060 (2014-02-15 14:00:59)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en folio kun kantoj prezentitaj dum la 12a jarkunveno de Germana Esperanta Fervoĵista Asocio (GEFA), la 12-an de oktobro 1968. Pri la tradukinto vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Clarence\\_Bicknell](http://eo.wikipedia.org/wiki/Clarence_Bicknell).*

*Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose of Summer" de THOMAS MOORE (\*1779-05-28 - †1852-02-25) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (\*1857-06-11 - †1921-07-04).*

*Arg-531-1059 (2010-03-28 21:24:14)*

*Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, kopiis el la retejo <http://www.netlibrary.net/eBooks/Wordtheque/eo/221211.TXT>.*

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas THOMAS MOORE (\*1779-05-28 - †1852-02-25).*

*Arg-531-1058 (2010-03-28 21:25:21)*

*Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun poemon el la retejo <http://www.franks.org/fr01066.htm>. Pri la verkinto, la irlanda poeto Thomas Moore, vidu la vikipedian retejon [http://en.wikipedia.org/wiki/Thomas\\_Moore](http://en.wikipedia.org/wiki/Thomas_Moore).*